

Konversacio kun geaŭdantoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 557/88-1, 1982 februaro 11 kaj 13.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-88/SRI-1982-88-1-557-Claude-kaj-Andree-GACOND-Konversacio-kun-geaudantoj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni ricevis tre interesan leteron de ĉeĥa aŭskultanto, sinjoro Jiri Patera en Praha. Li aŭskultis niajn recenzajn prelegojn pri la romano kaj traktaĵo de Karolo Piĉ: "La Litomiŝla Tombejo". Jen ni legas al vi, kion skribis nia ĉeĥa aŭskultanto Jiri Patera:

A.- "Mi dankas pro la interesa prelegserio de ges-roj Gacond pri la romano de Karolo Piĉ "La Litomiŝla Tombejo". Ke la verko estas pli interesa pro sia lingva formo ol pro la enhavo estas ne mirinde, ĉar Karolo Piĉ estas precipe poeto kaj lingvisto (akademiano), nur poste romanverkisto.

Cl.- Jiri Patera daŭrigaa skribante: "Karolo Piĉ estas tre bona originala esperanto-poeto; liaj poemoj estas ĉefe pri-amaj kaj lirikaj, vere tre ĉarmaj. Kompreneble verki belajn poemojn estas tre malfacila laboro kaj nur nemultaj kapablas tion fari. Sed verki bonan prozaĵon estas verŝajne ankoraŭ plj malfacile, kaj eble nur tial en la esperanta literaturo mankas pli multaj kaj kapablaj novelistoj kaj romanverkistoj, tute ne parolante pri la dramverkistoj. Tial okazas, ke la unu dum ĉiu jaro aperanta nova prozaĵo estas premiata kiel la "Libro de la Jaro", ĉar se aperus eble dek novaj verkoj, oni nur malfacile elektus inter ili unu pli gravan. Tial oni bonvenigas ankaŭ la romanon de Karolo Piĉ, eĉ se ĝi estas pli lingvistika verko ol vera romano. Kaj ĝuste tio min surprizis, ke la verkisto provas pliriĉigi la vortmaterialon de esperanto per novaj vortoj kaj novaj "eltrovaĵoj". Mi ja legis lian prelegon pri neologismoj el la jaro 1950 kaj mi havas la impreson, ke li estas kontraŭ grandkvanta kaj abrupta enkondukado de neologismoj en la lingvon kaj li kelkfoje eĉ malmilde tuŝis la klopodon de Kalocsay pliriĉigi la lingvon. Sed tiam li estis pli juna ol nun. Tiam li defendis la lingvon kontraŭ nenecesaj vortoj, nun li volas helpi ĝin per novaj vortoj, kvankam aliaj povas tion juĝi nenecesa. Sed la fina instanco, kiu aŭ akceptos aŭ rifuzos ĉiujn plibonigojn kaj novismojn, estas la esperantistaro mem.

A.- Poste Jiri Patera ankoraŭ interese raportas pri bedaŭrinde neokazinta prelego. Ni citas: "La Arta sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio preparis por ĵaŭdo la 10-a de decembro vesperon kun Karolo Piĉ. Ĉar mi aŭskultis viajn prelegojn, mi estis tre scivolema kaj antaŭĝojis je la renkontiĝo kun la verkisto. Sed bedaŭrinde la verkisto ne venis, kvankam laŭdire li promesis tion. Tial ne okazis la planita prelego pri la problemoj de la nuntempa esperanto-romano kaj ne estis legataj fragmentoj el la romano, ĉar la arta sekcio simple ne disponas pri ekzemplero de ĝi. Sed la vespero estis egale bona kaj interesa, ĉar estis anstataŭa programo dediĉita al Marjorie Boulton.

Cl.- Kaj Jiri Patera konkludis sian leteron per bondeziroj: "Estimataj gesamideanoj, mi dankas al vi pro via laboro, salutas vin kaj deziras al vi agrablan kristnaskon kaj prosperan novan jaron 1982-an. Via Jiri Patera.

A.- Ni ne havis la okazon legi la prelegon, kiun Karolo Piĉ faris antaŭ tridek jaroj pri la neologismoj, kaj al tiu, kiu havigos al ni la originalan tekston de tiu ĉi traktaĵo ni esprimos nian dankon per la alsendo de la libro "La Litomiŝla Tombejo". Eble ĉeĥa aŭskultanto povos tiel akiri tiun romanon, kiun la societo Ĉeĥa Esperanto-Asocio ne ankoraŭ posedis en decembro 1981. Ŝajnas, ke Karolo Piĉ multe evoluis en sia lingva sinteno, ĉar nun li malavare trudas al ni pere de sia romano novismojn, kiujn ni malfacile povas asimili, tiom ili abundas.

Cl.- Se Karolo Piĉ, kiu estis malhelpata por iri prelegi en decembro, povos tion fari alian fojon, ni tre esperas, ke s-ro Jiri Patera akceptos detale raporti pri liaj diroj, kiuj certe interesos multajn aŭskultantojn de nia Svisa Radio Internacia. La Arta Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazigas tre regule ege interesajn kunvenojn, Ĝenerale ili disvolviĝas ĉiun duan ĵaŭdon de la monato. Prelegas, deklamas, muzikas aŭ kantas ĉeĥe aŭ esperante ĉiaspecaj artistoj, kiel poetoj, verkistoj, komponistoj, muzikistoj, grafikistoj, pentristoj, skulptistoj ktp.

A.- Ni gratulas niajn ĉeĥajn gesamideanojn kaj aparte s-ron Jiri Patera pro la detalaj raportoj, kiuj akompanis lian leteron, kiun ni ĵus citis.

Cl.- En sia saluto d-ro Ludwig Röhl en Günzburg, Germanio okcidenta, ankaŭ mencias niajn elsendojn pri Karolo Piĉ: "Ekde duona jaro mi aŭskultas regule viajn elsendojn en esperanto. Vi elektis ĝuste tion, kio plej multe interesas la esperantistojn. Menciinda estas ekzemple viaj elsendoj pri instruo de esperanto sen uzo de alia lingvo, la nova romano de Karolo Piĉ, la sabata elsendo pri la nova disko de Olivier Tzaut. Ĉiam viaj elsendoj estas sur alta nivelo, vigla en la formo kaj ĉiam interesa pri la enhavo." Kaj li esprimis bondezirojn novjarajn, kiujn ni ankaŭ reciprokas, kaj por lin danki, ni konkludos la hodiaŭan elsendon per aŭdigo de kanzono el la disko dua, Karnavaŭeto de Olivier Tzaut, kiu ĵus eldoniĝis.

A.- Estos kontentaj pri tio gesinjoroj Mila kaj Gerard von den Horst en Hago, Nederlando, kiuj skribis: "Dankon pro via hodiaŭa Tzaut-konzerto, kiun ni je 49 metroj bonege povis aŭskulti."

Cl.- Ankaŭ menciis en sia poŝtkarta saluto la Tzaut-konzerton s-ro Miheliĉ Lucijan en Rovin, Jugoslavio. Li interalie skribas: "Tre plaĉis al mi, ke la esperantlingvaj kantoj pludaŭris ĝis la komenciĝo de la anglalingva programo, do ankaŭ ekster la esperantlingva elsendo."

A.- Ankoraŭ pluraj geaŭdantoj sin esprimis pri niaj prelegoj pri la romano de Karolo Piĉ. El ili ni hodiaŭ menciu s-rojn Marĉelo Trampuh en Kranĉiĉi, Jugoslavio, Fritz Walter Poppeck en Oberkirch, Germanio okcidenta: "Denove mi volas konfirmi al vi, ke viajn disaŭdigojn mi ĉiam sekvas kun granda intereso. Ankaŭ la pasinta sabato pri Karolo Piĉ estis tre instrua. Kontraŭe, Miheliĉ Lucijan en Rovin, Jugoslavio skribis: "Koncerne vian prezenton de la lingvaĵo de "Litomiŝla Tombejo" de Karolo Piĉ mi kuraĝu diri, ke vi iomete misprezentis ĝin. Kial ne simple diri, ke la romano ne estas verkita en esperanto! "Lucien Giloteaux en Croix, Francio, samopinias: "Pri Karolo Piĉ: ĉu liaj lingvaj fantaziaĵoj meritas tiom da reklamo? Temo interesa por lingvoamantoj, sed konfuziga por meza esperantisto"

Cl.- Koran saluton al ĉiuj, kiuj skribis. Ankoraŭ multaj leteroj kaj poŝtkartoj restas respondotaj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi ĉiuj: Ĝis reaŭdo!